

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ joulukuu ♦ decembro ♦ 5/2016



Nia vojaĝo tra Finnlando kaj
fabelaj tagoj en Taivalkoski, p. 16–20



- ♦ Vintraj Tagoj – Talvipäivät, Helsinki 4.–5.3.2017, p. 12–15
- ♦ Impresoj pri vojaĝo al Malta insularo en novembro 2016, p. 8–10
 - ♦ Somera kurso – Kesäkurssi, Rauma 15.–18.6.2017, p. 6-7
 - ♦ Novaj gvidantoj por la Belartaj Konkursoj de UEA, p. 4

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Cefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanjapa.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 25 €/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 264 2742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 300

Kansi/Pärm/Kovrile: Anna Striganova en fabela Arbaro de Zamenhof en Taivalkoski. Fotis: *Dima Ševčenko*.

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ 050 549 4709 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ tiina.kosunen945@gmail.com

Arja Kuhanen, Saratie 2, 31300 Tammela. ✉ arja.kuhanen@netti.fi

Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 524 5823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi

Börje Eriksson, Kulmakatu 10 A 6, 15140 Lahti. ☎ 040 779 3487 ✉ bovoeo73@gmail.com

Andrei Dumitrescu, ☎ 040 411 6579 ✉ dumiac@gmail.com

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 044 576 3314 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI82 5721 1520 2859 38 OKOYFIHH.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Oficejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.

☎ 044 264 2742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

Rafael Hertzberg (1845–1896) estas nuntempe plej konata pro la populara julkanto, kiun vi trovu sube. Li estis elstara kulturaganto inter la du lingvoj Finnlandaj kiel verkisto, tradukisto, historiisto, ekonomikisto, eltrovanto kaj publicisto. Studinte en Helsinki, li estis kulturredaktoro de svedlingvaj jurnaloj kaj aktivis ankaŭ en la socia debato, interalie pionire por balotrajto de virinoj kaj civitanaj rajtoj de judoj. Lia verkaro ampleksas sesdekon da titoloj, inter kiuj elstaras tradukoj el la finna literaturo: popola liriko inkluzive *Kalevala*, *Minna Canth*, *Juhani Aho* – al li la komuneco de la lingvogrupoj estis memkomprenebla socia celo. Li kreis infanliteraturon kaj teatraĵojn, interalie la tekston de la sola finita opero de *Sibelius* "Fraŭlino en turo". Krom el la finna, li tradukis el la franca, itala, angla kaj norvega. Ankaŭ tekniko por bono de homo ne fremdis; li i.a. konstruis skribmaŝinon por blinduloj. Bondeziro por Kristnasko kun lia julkanto kun redonoj finne kaj esperante estu omaĝo al li.

Rafael Hertzberg (1845–1896) muistetaan tästä pikku joululaulustaan, jonka tässä koetan antaa myös suomeksi ja esperantoksi (lauletaan "juokse porosein" -sävelellä). Hertzbergin suuryö oli kuutisenkymmentä teosta, enimmäkseen suomalaisten aikalaikirjailijojitten käännöksiä ruotsiksi. Hän oli aikansa kaksikielisyyden ja kansalaisyhteisyyden puolestapuhuja. Olkoon tämä siis myös kielipoliittinen kannanotto.

*Rafael Hertzbergs (1845–1896) stora gärning var ca sextio böcker, mestadels översättningar från samtida finska författare och finsk folklyrik. Han var förespråkare för landets tvåspråkighet samt kvinnors och minoriteters medborgerliga rättigheter. Idag minns han allmänt för den här lilla sången (sjunges som "spring min snälla ren"), här även på finska och esperanto. **God Jul!***

Tuomo Grundström



Kring julgranen

Nu så ha vi här julen i vårt hus.
Full med juleljus gröna granen är.
Klart från varje gren strålar deras sken.
Över tall och björk, över mo och ljung ligger drivan tung.
Kvällen är så mörk, här är glädje blott, här är ljust och gott.
Alla barn i ring far och mor också.
Glatt vi dansa må granen runt omkring.
Himlens änglar små dansa med också.

Kuusen luona

Nyt kun meillä on kuusi paikallaan käynyt loistamaan, ilta kirkas on.
Valon kynttiläin koti saa nyt näin.
Hanki hallava peittää metsät, haat, järven jäät ja maat alleen painava.
Täällä on valoisaa, ilo asustaa.
Tanssi yhteen tuo lapset piiriin, äiti, isäkin saapuu kuusen luo.
Enkeleitäkin yhtyy tanssihin.

Ĉe l'abio

Nun en nia dom' estas julofest' kaj en festa vest' staras arb' kun pomp'.
Bril' radias el flamo de kandel'.
Sur glacia ter', sur erikarbed' blanka nego, sed nigras la vesper'.
En la hejma pur' lum' kaj ĝojo nur.
Infanar' en rond' dancas gaje kun la gepatroj nun laŭ rondela son'.
Ankaŭ etanĝel' venis el ĉiel'.



Novaj gvidantoj por la Belartaj Konkursoj de UEA


La Estraro de UEA nomumis, per unuanima decido, la novan Prezidanton kaj la novan Sekretarion de la Belartaj Konkursoj de UEA: *Miguel Fernández Martín* kaj *Miguel Gutiérrez Adúriz*.

Kun granda dankemo al la antaŭa Prezidanto *Humphrey Tonkin* kaj al la antaŭa Sekretario *Michela Lipari* pro ilia multjara engaĝiĝo, ni deziras bonan laboron al la novaj gvidantoj, kies biografiaj notoj troviĝas sube.


Miguel Fernández Martín naskiĝis en Granaĉo (Hispanio), en 1950. Tie li studis solfeĝon kaj kant-arton. En 1968 li transloĝiĝis al Madrido kaj ekstudis en ĝia Politeknika Universitato. Li esperantistiĝis en 1980. Inicijatinto de la Lirikaĵ Festoĵ de HEF kaj de la kolektivaĵ spektakloĵ *Vivu la teatro!* kaj kunfondinto de la Ibera Skolo aŭ Ibera Grupo de E-verkistoj. Miguel gajnis plurajn premiojn en la Belartaj Konkursoĵ de UEA kaj en la Internaciaĵ Floraj Ludoĵ, li kunlaboras en diversaj revuoj, inter ili *Beletra Almanako*, *Sennaciulo*, Sennacieca revuo kaj *Boletín* de HEF. Aŭtoro de la lirika-muzika spektaklo kadre de la 78-a UK. Nuntempe Fernández tenoras ĉe la madrida plektr-orkestro *Calle del Barquillo*. Ĉefaj verkoĵ: poemkolektoĵ, rakontoĵ, noveloĵ, eseoj-prelegoĵ; tradukoĵ, teatraĵoĵ.

Miguel Gutiérrez Adúriz (pseŭdonime: *Liven Dek*, *Svena Dun*, *M. Zocato* kaj aliaĵ) naskiĝis en 1950 kaj estas kemia inĝeniero. Kiel verkisto, li estas aŭtoro de diversaj noveloĵ - el kiuj pluraj disponeblas en diverslingvaj tradukoĵ -, precipe en la verkoĵ Ekstremoĵ. Ne ekzistas verdaĵ steĵoĵ kaj en la libroserio Sferoĵ. Liaĵ poemoĵ aperis en *Ibere libere*, komuna poemaro de la Ibera Skolo, kaj dise en diversaj revuoj. Li tradukis en Esperanton kelkajn librojn kaj kontribuis per siaĵ tradukoĵ al pluraj aliaĵ libroĵ kaj revuoĵ. Kiel preleganto kaj gvidanto de literaturaj kursoĵ, li partoprenis en diversaj seminarioĵ kaj kongresoĵ. Grafike li kontribuis al la Esperanta kulturo per la dezajno de librokovriloĵ, ekzemple por la serio Originala Literaturo de IEM. Kiel eldonisto, li kreis plurajn libroseriojn (Sferoĵ, Hispana Literaturo ktp), kaj publikigis verkojn de aliaĵ aŭtoroĵ. Krome, li establis kaj administras kelkajn plene Esperantajn jutubajn kanalojn, kiujn li nutras per memfaritaj kulturaj filmetoĵ diverstemaj. Iama membro de la Akademio de Esperanto, li verkis la dudirektan vortaron Amika kaj lernolibron de Esperanto por hispanlingvanoĵ.

laŭ GK 653



Miguel Fernández Martín, Foto: RB



Miguel Gutiérrez Adúriz, Foto: RB

UEA aĉetis loĝejon por volontuloj en Roterdamo

Sekve de Estrara decido el februaro 2016, UEA aĉetis loĝejon kun pluraj dormoĉambroj por volontuloj en Roterdamo. Ĝi situas en la sama strato kiel la Centra Oficejo, je proksimume 10 minutoj piedire.

”Tia spaco estas bezonata”, klarigas la Ĝenerala Direktoro de UEA, *Veronika Poór*, ”ĉar kaj UEA kaj TEJO volas plimultigi la volontulojn en la Centra Oficejo. La bonfarto de niaj volontuloj estas tre grava prioritato, kaj ni opinias ke la nova domo helpos krei taŭgajn kondiĉojn por ili.”

La ampleksiĝo de la Volontula Servo de UEA kaj TEJO jam komenciĝis. UEA jam bonvenigis la unuajn volontulojn elektitajn laŭ malferma alvoko en decembro 2015, dum TEJO sukcese petis subvenciojn de eŭropaj instancoj por gastigi pluroble pli da volontuloj ol pasintjare. Nova alvoko baldaŭ sekvos.

”La aĉeto de domo estas ankaŭ prudenta financa investo”, komentas *Martin Schäffer*, Ĝenerala Sekretario de UEA. ”Per lupagoj UEA ricevos pli ol ĝi povus gajni per ordinara bankdepono. Tamen estas ankaŭ grave ke niaj membroj subtenu la Volontulan Domon per siaj donacoj, ĉar tio helpos nin fari ĝin komforta kaj taŭga por la volontuloj kaj kovri la restadon de volontuloj ekster Eŭropo, kiuj ne povas profiti de la samaj subvencioj kiel eŭropanoj.”

La Estraro de UEA tre dankas al la donacintoj, kiuj helpis por la aĉeto de la domo per la sumo de 7877,66 €.

Por ricevi pliajn informojn bv. skribi al: domo@co.uea.org. Donacojn eblas fari al la kontoj de UEA. Vidu: <http://uea.org/alighoj/pagmanieroj> Bonvolu aldoni priskribon: *Konto voldom*.

GK 638

UEA fariĝis la oficiala sponsoro de Amikumu

Post diversaj diskutoj kaj intertraktoj, la Estraro de UEA decidis apogi la novan retan projekton Amikumu. UEA estas nun ĝia Oficiala Sponsoro. La projekto celas krei kaj evoluigi programeton (aplikaĵon) por poŝtelefonoj, kiu ebligas al parolantoj de elektita lingvo trovi samlingvanojn en sia proksimeco.

”La utileco de tia aplikaĵo por esperantistoj estas klara,” komentis *Mark Fettes*, la Prezidanto de UEA. ”Iusence ĝi estas ĝisdatigo de la plej malnova servo de UEA, la Delegita Reto, kiu same celis plifaciligi kontaktojn inter homoj dum vojaĝoj aŭ pri komunaj interesoj.”

La programistoj de Amikumu estas du el la plej konataj retaj aktivuloj de la interreta generacio: *Chuck Smith*, elektita kiel Esperantisto de la Jaro 2015, kaj *Evildea (Richard Delamore)*, la plej spektata Esperanto-filmisto ĉe JuTubo.

”Amikumu ne nur celas esperantistojn,” klarigas *Evildea*. ”Ĝi celas parolantojn de ĉiuj el la 7.000+ mondaj lingvoj (inkluzive 100+ signolingvojn). Tio signifas, ke Amikumu servos kaj

esperantistojn kaj neesperantistojn egale. Ekzemple, se vi parolas la ĉinan kaj interesas vin kudrado, vi povos uzi Amikumu por trovi proksimulojn, kiuj parolas la ĉinan kaj ankaŭ havas la saman hobion.”

Antaŭ du semajnoj, la skipo de Amikumu lanĉis monkollekton per la retejo *Kickstarter*, kiu jam alportis pli ol 25.000 €. La sukceso de la monkollekto grandparte fontas de tio, ke ĝi furoras inter ne nur esperantistoj sed ankaŭ poliglotoj, surduloj kaj parolantoj de minoritataj lingvoj.

”Ni ĝojas kunlabori en projekto, tiel konforma al la valoroj de la Manifesto de Prago,” aldonis *Fettes*. ”Ni ankaŭ tre dankas la diversajn donacintojn, kiuj same kiel ni decidis konkrete subteni la skipon de Amikumu.”

Por ricevi pliajn informojn bv. skribi al: info@amikumu.com. Donacojn eblas fari al la Amikumu-konto de UEA [amku-r]. Vidu: <http://uea.org/alighoj/pagmanieroj>. Bonvolu aldoni priskribon: *Donaco*.

laŭ GK 647

Somera kurso – Kesäkurssi, Rauma 15.–18.6.2017

Ankaŭ venontsomere okazos kompreneble Somera Esperantokurso de Esperanto-Asocio de Finnlando (EAF) kunlabore kun ELFI. Ni atendas multnombran partoprenadon. Ni havos kaj novan lokon, la urbon Rauma, kaj novan instruiston **Magdaléna Fejfičová** aŭ **Fejfi** el Slovakio.

Fejfi havas multflankan trejnadon kaj scion pri instruado de Esperanto kaj ŝi tre entuziasme atendas la someran kurson, kie ŝi pretas instrui kaj elementanojn kaj progresantojn. La kurso okazos en la bela sud-okcidenta urbo **Rauma**, kiun ni lernos koni en ankaŭ praktikaj situacioj: dum butikumado, dum konatiĝo kun vidindaĵoj, dum diskutoj en la klasĉambro kaj promenante. Eble ni eĉ lernos puntadon, la faman manlaboron en Rauma.

Kursogvidanto kaj helpinstruisto estos denove *Tiina Oittinen* kaj ĉi-jare nin helpas ankaŭ nia konata raŭma-ano *Tuomo Grundström* kaj la ELFI-prezidanto *Sylvia Hämäläinen*.

Fejfi komencis esperantumi en la jaro 1987 kaj unue aktiviĝis en loka asocio redaktante diversajn bultenojn kaj aranĝante eventojn, i.a. por fervojistoj. Ŝi partoprenis ofte internaciajn Esperanto-aranĝojn kiel fervojistajn kaj universalsalajn kongresojn.

Antaŭ kelkaj jaroj Fejfi konstatis, ke plej bone oni lernas la lingvon, kiam oni ĝin instruas al la aliaj. La unuaj instigoj tiadirekte venis dum la kursoj dum SES (Somera Esperanto-Studadoj) en Slovakio, poste sekvis KER-ekzamenoj (ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referencokadro) kaj unujara metodika seminario por instruistoj en la Universitato de *Adam Mickiewicz* en la pola urbo *Poznań*. Nun ŝi partoprenas en RITE-studado (Reta Instruista Trejnado) ĉe *Edukado.net*.

Fejfi instruis Esperanton dum la Internacia Esperanto-Feriado en Pollando kaj la Internacia



Fejfi kaj
Sylvia

Esperanto-Lernejo en Ĉeĥio. En sia hejmurbo *Žilina* en Slovakio ŝi daŭre gvidas kursojn de Esperanto por komencantoj por la lokaj interesuloj, ĉu enkadre de la Taga Centro (por pensuloj) aŭ lastatempe enkadre de la Regiona Biblioteko por ĉiuaĝuloj.

Notu jam la kursodatojn kaj sciigu viajn geamikojn kaj gekonatulojn.

Informiĝu kaj aliĝu al sekretario de EAF: *Tiina Oittinen*, eafsekretario@esperanto.fi, tel. +358-50-5494709.

Informojn pri kursopraktikaĵoj donas ankaŭ *Tuomo Grundström*, tuomo.grundstrom@gmail.com, tel. +358-440-199766.

En venontaj gazetoj kaj en niaj retpaĝoj aperos printempe pliaj informoj kiel kursokotizoj kaj la detala kursoprogramo!

Myös ensi kesänä Suomen Esperantoliitto (EAF) järjestää yhdessä opettajien järjestön ELFIN kanssa kesäkurssin. Kurssipaikka on

tällä kertaa Rauma ja opettajamme **Magdaléna Fejfičová** eli **Fejfi** tulee Slovakiasta.

Yhdessä Fejfin kanssa odotamme jo innolla uudenlaista kurssia. Opiskelemme perinteisesti luokassa, mutta myös tutustumme kaupunkiin ja käytämme esperantoa siellä mm. ostoksilla ja nähtävyyksiä katsellen. Ehkä opimme jopa pit-sinnypläystä.

Kuten ennenkin opetusta on kaikilla tasoilla: kieleen vasta tutustuvat aloittavat alkeista ja jatkoryhmä taas kertaa jo aiemmin oppimaan- ja opettamaan. Fejfi opettaa kaikkia ryhmiä vuorotellen apuopettajien kanssa.

Kurssivastaava ja apuopettaja on jälleen **Tiina Oittinen** ja tällä kertaa mukana kurssijärjestelyissä ovat myös **Tuomo Grundström** Raumalta ja **Sylvia Hämäläinen** Tampereelta (kaikki ovat ELFIn jäseniä).

Fejfi tutustui esperantoon vuonna 1987 ja alkoi aktiivisesti toimia paikallisessa yhdistyksessään. Hän alkoi myös heti osallistua kansainvälisiin esperanto-tapahtumiin.

Muutama vuosi sitten Fejfi totesi, että kieltä oppii parhaiten opettamalla sitä itse. Hän aloitti vetämällä kursseja Slovakiassa, suo-

ritti sitten Esperanton maailmanliiton ylioppilaskokeen tasaisen tutkinnon ja jatkoi opin- toja Adam Mickiewicz -yliopistossa Puolan Poznańissa. Parhailtaan hän suorittaa verkko- opiskeluna esperanto-opettajien jatkokurssia. Alun jälkeen Fejfi on opettanut useissa esperan- totapahtumissa esim. Puolassa ja Tseikeissä. Hänen kotikaupunkinsa on Žilina, Slovakiassa, ja siellä hän opettaa jatkuvasti eri-ikäisiä aloit- telijoita ja jatko-opiskelijoita.

Merkitse kurssipäivät kalenteriisi ja kerro kurssista myös ystäville ja tuttaville. Ilmoit- tautuminen EAF:n sihteerille: Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi, puh. 050-5494709. Häneltä saat myös lisätietoja kurssista. Kurs- sikäytännöistä ja Raumaan liittyvistä asioista antaa tietoa myös: Tuomo Grundström, tuomo. grundstrom@gmail.com, puh. 0440-199766.

Lisätietoja (kurssimaksut, päivittäinen ohjel- ma ym.) kerromme lehden seuraavissa nume- roissa ja nettisivuillamme.

Bonvenon al Rauma! Tervetuloa Raumalle!

Tuomo, Fejfi, Sylvia kaj Tiina

Ponto el vortoj: Esperanto kaj la revo pri universala lingvo

En la komenco de oktobro 2016 aperis en Usono anglalingva verko pri Esperanto kaj ĝia movado. La titolo sur la kovrilpaĝo estas *Bridge of words: Esperanto and the Dream of a Universal Language*. Verkis ĝin profesorino de la angla lingvo *Esther Schor*, kiu mem tradukis la titolon en Esperanton.

En la konata retgazeto *Libera Folio* skribis *Stewen Brewer* tiel brilan recenzon, ke mi tuj emis informi al miaj samlandanoj pri la unika publikaĵo. Feliĉe mi sukcesis raketstile mendi kaj aĉeti propran ekzempleron en la Libro-Ser-

vo de UEA, kie *Ionel Oneț* promesis kiel eble plej rapide liveri la trezoron al mia hejmloko *Piŝpanristi*.

Profesorino Schor akcentas la valoron kaj signifon de la vere funkcia kaj vivanta internacia lingvo Esperanto. Kompreneble indas kaj necesas reveni al la temo pli poste. La enhavo la aŭtorino konstruis per interesa, tre persona maniero. Legontoj renkontos gravan mejloŝtonon sur movada kaj lingva kampoj.

Jorma Ahomäki

Impresoj pri vojaĝo al Malta insularo en novembro 2016

Post kvarhora flugo el Stokholmo nia aviadilo alproksimiĝas Malton. Tra la fenestreto mi rapide ekvidas krutajn altajn rokobordojn kaj bluan maron. Ne eblas elŝipiĝi tie ĉi. Aspektas ja bele sed iom timige. La roko ŝajnas vundiga, akra, malinvitema.

Mi kun la aliaj grupanoj enbusiĝas por veturi norden. Ambaŭflanke de la vojo vidiĝas flavoranĝaj malaltaj loĝdomoj malnovaj, bariloj kaj muroj faritaj el la sama ŝtono kiel la dometoj, neregulaj agretoj kaj parceloj inter la bariloj. Tie nenio kreskas nun, la rikolton oni jam forportis kaj la teron erpis. Ŝajnas, ke ĝi estas kultivata de tre longa tempo kaj ke ĉiun ŝtonon en la murojn kaj barilojn portis la manoj de generacioj antaŭaj dum jarmiloj. Certe la bruna humo estas valora, ĝi atendas semojn kaj plantojn de la sekva kreskosezono. Oni nefacile renoncus de la pra-ava heredaĵo, ĉiu parcelo gravas al sia posedanto. Ne videblas trudherboj aŭ rubaĵoj.

La buso haltas ĉe nia hotelo *Qawra Palace*. La vetero estas varma, ekpluvas. Ni ŝvitas en niaj nordaj vintrovestoj. La trafiko kuras maldekstre, kiel en Britio. La aŭtoj ŝprucigas akvon el la pli kaj pli grandiĝantaj flakoj. Fakte estas preskaŭ inundo, tamen bonvena al malitanoj, kiuj scias, ke akvo mankas post la varmega somero. Malgraŭ la pluvego mi rimarkas, ke la tago estas pli luma kaj longa ol en Finnlando. Oni aŭdas la ondojn de la maro. Ĝuste tie ĉi pereis en la jaro 60 de nia erao la ŝipo de apostolo Paŭlo (legu ĉapitron 28 en La Aĝoj de Apostoloj en la Biblio). La golfeton oni nun nomas *San Pawl il-Baĥar*. La horizontala streketo sur la "h" sonas kiel nia Esperanta "ĥ". La angla nomo estas *St. Paul's Bay*.

Nia ĉambro situas en la 7-a etaĝo. Sur la balkoneto povas sidi nur du personoj, de sur ĝi ni vidas sube la korton ĉirkauatan de muroj 8

etaĝaj. La hotelo havas almenaŭ 350 ĉambrojn. En la korto verdaj arbetoj, kelkaj ruĝaj floretoj, blanka altaro por Maria, antikva statueto pri ĉasisto kaptinta cervon per la kornoj, du bustoj de lokaj famuloj *Vella*, mini-golfo sur plasta gazono. En klara nokto ni vidas super ni luserpon kvazaŭ kuŝantan, iunokte unu-du stelojn. La elektra lumo en la ĉambro ne estas tre bona por legado. En la banĉambro duŝo kaj peto konservi akvon tiel ke oni ne vane lavigu siajn viŝtukojn. Ĉio pura, renovigita en 2016.

Vespermanĝo bufeda en vasta manĝejo. Ni elektu el inter du bongustaj supoj, (mal)varmaj viandaĵoj, fiŝaĵoj, legomaĵoj, 3–4 fromaĝoj, pastaĵoj, rizajoj, terpomaĵoj. En pluraj pladoj la lango sentas fremdajn spicherbojn. Multaj el ni aĉetas boteletojn da vino. La akvo odoretas je kloro. Desertoj fruktaj, kukaj, glaciaĵoj, kazeoj, jogurtoj, melon-tranĉaĵoj. Matene oni povas plenigi sian stomakon tiel saĝe ke oni eltenos sen lunĉo ĝis la vespermanĝo: kaĉo, rostita pano kun surmetaĵoj, sukera kaj ĉokolada kukegoj, diversaj kafoj, teo. La "ĵuis" ne gustas nature, certe ne el freŝaj fruktoj sed limonadaĵo.

Kulturaj ekskursoj per buso. La scioplena ĉiĉeronino senpaŭze elbuŝigas siajn nelĉerpeblajn sciojn en la sveda lingvo. Mi ne multon komprenas pro mia duobla handikapo: malbona aŭdo kaj nekutimiteco al sveda lingvo. Mia amikino interpretas, sed mi diras, ke ŝi nur aŭskultu kaj lernu, rakontu poste. Mi registras la impresojn perokule kaj perfotile. Ŝi peras al mi la plej gravajn sciigojn. (Inter ni ŝi kaj mi parolas Esperante, pluraj homoj venas demandi pri nia lingvo.) Malto havas nek arbarojn, nek riverojn, nek lagetojn. La plej grandaj sovaĝbestoj estas leporoj. Oni manĝas tradiciajn kuniklaĵojn, ĉar kunikloj de longe estas fonto de proteino. La riĉofontoj estas mara salo, kalkŝtono, nuntempe turismo. La plej gravaj

plantoj kultivataj estas terpomo, cepo, diversaj brasikoj, vitoj, spicoherboj, olivarboj, tomatoj, tritiko. Ĉu la melonoj, kukumoj kaj kukurboj estas enlandaj, mi ne scias. Oni importas vinberojn el Italio por povi fari pli da vinoj en Malto, la lokaj vitejoj malgrandas. Industrioj ŝipkonstrua, teksa, filma, turismo.

Ni vizitas la parkon ĉe la prezidenta rezidenco. La nuna prezidento estas ina, *Marie-Louise Coleiro Preca*. Ŝi malfermis la belan parkon por la tuta popolo, inkluzive turistojn. Malto fariĝis respubliko en 1974. Oni ne okazigas baloton sed invitas iun prezidento dum 5-jara mandato. La ĉefministro havas pli da potenco ol la geprezidentoj. La oranĝoj de la parko estas donacataj al malsanuloj kaj malriĉuloj (Ni nenie vidis eĉ unu almozulon). En la parko kreskas arboj el aliaj kontinentoj. Min imponas dikegaj aŭstraliaj figo-arboj, palmoj, altaj eŭforbioj (*Poinsettia*, finna "Julstelo"), plene florantaj tagetoj kaj sennombraj nekonataj arboj kaj florplantoj. En artefaritaj laĝetoj plonĝetadas kaj naĝas anasoj, cigno, rampas testudoj. Sur la padoj kaj aleoj kelkaj junpatrinaj kaj gepatroj kun beboĉaretoj, olduloj, geamantoj – inter ili ni...

Vespere ni iras al la strando por aŭskulti la ondojn, kiuj ŝaumiĝante batiĝas kontraŭ la rokojn. Koloroj de vesperruĝo romantike plibeligas la vidaĵojn. Malrapide krepuskiĝas post la 17-a horo. Plonĝistoj elrampas el la maro. Kion ili serĉis tie? Proksime staras granda Nacia Akvario kun ludparko *Naitilus* por infanoj, grandaj terasoj kaj naĝejo por (someraj) vizitantoj, fontanoj amuze kaj neatendite elŝprucantaj el la grundo.

Dumekskurse ni konatiĝas kun la historio. Oni ne scias, de kie venis homoj al Malto en la ŝtonepoko, kupra epoko, bronzepoko. Ili konstruis siajn templojn por la adorado de la Suno kaj fekundeco. Ilian dikan dipatrinon fekundan ili montris per malgrandaj skulptaĵetoj kalkŝtonaj. La jarmilaj pluvoj kaj ventoj erodis la grandegajn templojn, sed nun ilin ŝirmas tolaj tegmentoj, por ke ne ĉio forlaviĝu. Nuntempuloj ne komprenas, kiel la prauloj antaŭ

5000–7000 jaroj kapablis transporti kaj starigi ŝtonblokojn pezantajn 20–30 tunojn. Post tiuj epokoj venis fenicioj, grekoj (Odiseo pasigis dek jarojn en la groto de Kalipso, ĉu kiel seks-sklavo?), kartaganoj, romianoj, bizancanoj, araboj, hispanoj, turkoj. La regno de la kruckavaliroj, nomataj ankaŭ johanitoj aŭ la Malta ordeno, daŭris pli ol 200 jarojn, tiu de Napoleono nur du jarojn, kaj la britoj regis Malton dum 150 jaroj. Tial la malta lingvo, kiun nun parolas 94% el la popolo, enhavas elementojn el ĉiuj tiuj lingvoj. La anglan parolas 6% kaj ĝi estas la dua lingvo de la ŝtato.

Turistojn allogas la trezoroj de baroka kaj renesanca arkitekturo, artoj. La johanitoj siatempe multon elspezis por la konstruado kaj plibeligado de preĝejoj, urboj, fortikaĵoj. Ilia ĉefa celo estis defendi la romkatolikan kredon. Evidente ili sukcesis, ĉar ankoraŭ nun 99% el la maltanoj estas katolikoj kaj ĉie oni vidas sanktejojn kaj religiajn memorigaĵojn.

Ni vizitas citadelojn de arabaj kaj johanitaĵoj. Malta estis bombardita dum la dua mondmilito, ĉar ĝi estis bazo de la Alianco. Oni multon restaŭris ankaŭ post tertremoj kaj pli fruaj militoj kaj daŭre oni restaŭras. En *Mdina*, la ĉefurbo antaŭ la tempo de la johanitoj, oni paŝadas laŭ mallarĝaj stratetoj admirante la arkitekturon kaj artaĵojn ĉirkaŭe. Renkonte venas ĉevalo veturiganta du pasaĝerojn en ĉarma kaleŝeto. *Mdina* estas nomata *Silenta urbo* kaj nokte okazas ekskursoj por aŭdi la silenton. Tage tie tamen trafikas kelkaj aŭtoj. En alia fortikaĵo, en insulo Gozo, la tuta loĝantaro kun sia brutaro ĝis preskaŭ la 18-a jc devis nokte ŝirmiĝi en la citadelo, ĉar rabistoj pretis kapti infanojn kaj sanulojn laborkapablajn, forportante ilin kiel sklavojn. Kelkaj el ni faras pagandan kromekskurson al iu bieno. Nia buso haltas ĉe foiroj, kie vendatas tradiciaj manlaboraĵoj; vitraĵoj, ceramikaĵoj, tablotukoj kaj aliaj teksaĵoj, trikitaĵoj, ornamaĵoj. Ĉe marborda foiro afrikanoj vendas siajn afrikdevenajn objektojn, sunokulvitrojn ktp. Fiŝvendistoj per ventumilaĉo forpelas muŝojn de sur la okto-



podoj kaj aliaj marbestoj kuŝantaj sur glacipecoj. Je la tagmeza horo surdige sonoras la sonoriloj de la apuda preĝejo. Lertaj viroj en la du turoj tiradas la ŝnurojn por ludi rekoneblajn melodiojn dum duonhoro. Sur la akvo flosas koloraj lignaj boatoj "luzzu", ambaŭflanke de la pruo ili havas pentritan okulon kiel ŝirmilon kontraŭ malbonŝanco.

Unu tago en la nuna ĉefurbo *Valletta*, tre dense konstruita, pli ol 1400 loĝantoj en kvadrata kilometro. Stratoj tute rektaj, kvartaloj kvadrataj. La urbon fondis Grandmajstro *Jean de Vallette*, lia statuo staras en iu skvaro. Kelkaj ruinoj ĉe la sentegmenta Operejo bombardita. Bonega haveno. Kafeejoj, muzeoj, restoracioj, kelkaj kvietaj parketoj verdaj kaj ombrozaj. Sur la dom-muroj tipaj balkonoj en malnova stilo de la tempo, kiam la virinoj de la domo ne descendu en la stratojn sed vidu la vivon sidante kaj brodante, puntante, klaĉante kaj babilante en la balkonetoj. Videblas kristnaskaj dekoracioj ne ankoraŭ ŝaltitaj. La Granda Tago estos la 8a de Decembro, Tago de la Senmakula Koncipiteco de Virgulino Maria. Tiam la dekoracioj eklumiĝos. Preĝejoj, klostroj. La norvega svedeparolanta ĉiĉeronino provas enkapigi al ni 7000-jaran historion en unu semajno. Interesege sed ne eble. Ŝi pliriĉigas sian paroladon per

lokaj rakontoj kaj legendoj, ĉar en sia infanaĝo ŝi loĝis en Malto.

Kompreneble ni laciĝas. Venas la tago por la reira flugo. La aviadilo skuiĝas de fortaj ventoj dum unu-du horoj. Mi nenion vidas tra la fenestroj, nur grizon. Ni iom timetas sed neniu panikas. En Svedio atendas nin vintro. Kia neforgesebla vojaĝo!

*Siajn impresojn rakontis
Raita Pyhälä*

Faktoj pri Malto

Respubliko sude de Sicilio, konsistas el 8 insuloj, entuta areo 316 kv. kilometroj, loĝantaro 412.000 (en 2012), el kiuj la plej granda parto loĝas en la plej granda insulo, nomata Malto. Aliaj insuloj nomiĝas Gozo, Comino, Cominotto, Filfla.. kaj ne ĉiuj estas prilogaĵoj.

Lingvoj malta (94%), angla (6%); kelkaj maltanoj konsideras sin multlingvanoj (3%)

Monunuo eŭro. La 2-eŭra kaj 1-eŭra moneroj havas sur sia malantaŭo la Maltan krucon, alinome kruco de la Johanita Ordeno.

Reprezentante UEA en ALTE-konferenco en Helsinki

Kiel reprezentanto de UEA ĉe la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo mi partoprenis la 49-an ALTE-konferencon inter 16-a kaj 18-a novembro 2016 en Helsinki, Finnlando.

La ĉeftemo estis: La estonto de cifereca ekzamentaksado. La eventon komune organizis la Universitato de *Jyväskylä* kaj la Finna Nacia Edukinstanco (NBE) en Helsinki. En la ALTE-konferenco partoprenis 88 delegitoj el tuta Eŭropo kaj aliaj 70 personoj aliĝis al la

publike viziteblaj prelegoj en la lasta konferenca tago.

La ĉefcelo de tiu konferenco estis montri la defion kaj avantaĝojn de uzado de moderna teknologio en la lingvo-instruado kaj testado. Per la disvastiĝo de perkomputila, interreta lingvolernado, per la vasta uzo de elektronikaj aparatoj kaj saĝtelefonoj estas pli kaj pli granda bezono ankaŭ je la uzado de tiuj iloj en la administrado, manaĝado, plenumado kaj

prijuĝado de lingvoekzamenoj. La elekto de Finnlando por tiu konferenco ne estis hazarda: en 2016 la unuan fojon ĉi tie parto de la abiturienta ekzameno okazis per komputiloj kaj en septembro Universitato Jyväskylä organizis perkomputilan testadon en la germana lingvo.

Dum la tritaga konferenco okazis pluraj laborkunsidoj. Novaĵo estis la laborgrupo pri teknologio por lingvoekzamenado. Ĝia bezono venis el la postuloj de la nuna tempo por raciigi ekzamenadon kaj laŭeble multkampe, multcele uzi ciferecajn solvojn. En la diskut rondoj mi rakontis pri la uzata sistemo de niaj UEA-KER-ekzamenoj, kiu jam havas elektronikan aliĝilon, grandparte perretan informadon kaj administradon, paralelan tutmondan skriban ekzamenadon en specialaj ekzamen tagoj, perkomputilan buŝan ekzamenadon per uzo de *Skype* ktp.

Eluzanta la okazon viziti la finnan ĉefurbon, mi kontaktis lokajn esperantistojn antaŭ mia alveno kaj elkore dankas al ili pro la varmkora akcepto. Mia kolegino *Raita Pyhälä* atendis min en la flughaveno kaj akompanis min ĝis la urbocentro klarigante multe pri lokaj kutimoj, servoj, ktp. Mi dankas ankaŭ al *Jukka Pietiläinen* pro la bona oferto de tranoktado kaj la afabla prizorgado, ĉiĉeronado dum mia restado en Helsinko. Mi ŝatus rekompenci tiun bonvolemon per invito al vizito al la Esperanto-Centro en *Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo!*



Inaŭguro de la konferenco



Zsófia Kóródy kun gekolegoj dum la festvespero (en eleganta restoracio en iama prizono)

Koran bonvenon ankaŭ al aliaj vizitantoj, gastoj. Nia jarprogramo kaj informoj pri nia agado estas troveblaj ĉe <http://esperanto-urbo.de>

Zsófia Kóródy

Rezultoj de la Akademia elekto

39 akademianoj voĉdonis por elekti la direktoron de la Sekcio Literaturo de la Akademio de Esperanto.

Kiel direktoro estas elektita *Humphrey Tonkin*.

La estraro de la Akademio de Esperanto: *Probal Dasgupta*, prezidanto; *Brian Moon*,

vicprezidanto; *Otto Prytz*, vicprezidanto; *Renato Corsetti*, sekretario.

Oficialaj informoj n-ro 28,
21.11.2016

Vintraĵ Tagoj – Talvipäivät, Helsinki 4.–5.3.2017

Hotel Arthur, Vuorikatu 19, Helsinki

PROGRAMO – OHJELMA (ŝanĝoj eblas, *muutokset mahdollisia*)

SABATO – LAUANTAI 4.3.2017

- 10.00-12.00 ... Kunvenoj de membroasocioj de EAF laŭ alvokoj. Jarkunveno de ELFI je 10.00. *Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöjen kokouksia. ELFI:n vuosikokous klo 10.00.*
- 11.30-12.50 ... Akceptejo malferma en la aŭlo de la hotela kunvenejo. *Ilmoittautuminen hotellin kokoustilojen aulassa.*
- 12.00-13.00 ... Lunĉo en la hotela restoracio (memserva tablo). *Lounas hotellin ravintolassa.*
- 13.00-15.00 ... Malfermo de la Tagoj. Publika prelego finnlingve. Hotela kunvenejo: Aŭditorio. *Päivien avaus. Yleisöluento. Hotellin kokoushuone: Auditorio.*
- 15.00-15.30 ... Kafo/teo. *Kahvi/tee.*
- 15.30-17.30 ... Jarkunveno de EAF (komence kontrolo de rajtigiloj). *Suomen Esperantoliiton vuosikokous (aluksi valtakirjojen tarkastus).*
- 17.30-19.00 ... Prezento de filmoj kaj fotoj de la vivo de *Vilho Setälä* kaj pri aliaj eventoj. Libera kunestado. Libroservo malfermita. *Filmejä ja valokuvia Vilho Setälän elämästä ja erilaisista tapahtumista. Vapaata yhdessäoloa. Esperantotavaroitten basaari.*
- 18.30-19.00 ... Akcepto de Societo Nino Runeberg (por membroj). *Nino Runeberg -seuran vastaanotto (jäsenille).*
- 19.30-21.00 ... Vespermanĝo en restoracio de la hotelo laŭ mendoj (proprakoste). *Illallinen hotellin ravintolassa etukäteistilausten mukaan (omakustanteisesti).*

DIMANĈO – SUNNUNTAI 5.3.2017

- 11.00-12.00 ... Gvidata vizito en la hejma muzeo de *Mannerheim* en Kaivopuisto. *Opastettu vierailu Mannerheimin kotimuseoon Kaivopuistossa.*
- 12.30- Adiaŭa lunĉo en konvena restoracio proprakoste. *Päättöslounas sopivassa ravintolassa omakustanteisesti.*

En la jaro 2017 Finnlando fariĝos 100-jara kaj EAF 110-jara. Tial ni decidis havi Vintrajn Tagojn en la centro de la ĉefurbo Helsinki. La ejo, **hotelo Arthur en Kaisaniemi**, estas konata por multaj, ĉar ofte okazis tie Esperanto-aranĝoj dum la pasintaj jaroj. Nia kunvenejo estos la aŭditorio de la hotelo. Ĉi-foje ni lunĉos kaj kafumos sabate kune en la hotelo.

En la programo estos prelegoj kaj podia diskuto lige al la Esperanto-fenomenoj en Helsinko kaj Finnlando. La prelegantoj certigos en januaro.

La jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos sabate post la publika prelego en la hotela kunvenejo. Estos grave, ke vi ĉeestos por decidi pri komunaj aferoj kaj pri estonteco de la asocio. Post la jarkunveno okazos akcepto por membroj de *Societo Nino Runeberg*, aliĝu por subteni nian asocion. En la vesperumo ni konatiĝos en historio de EAF: vidos filmojn kaj fotojn i.a. de *Vilho Setälä*. Post vesperumo en la kunvenejo tiuj, kiuj deziras povos vespermanĝi kune en la restoracio de la hotelo.

Dimanĉe ni aŭdos pri Finnlanda historio, kiam ni vizitos en la hejma muzeo de marŝalo de Finnlando, *Carl Gustaf Emil Mannerheim*. Li loĝis en la ligna vilao en *Kaivopuisto* dum la jaroj 1924–1951.

Aliĝu plej eble baldaŭ, la unua limdato estas jam la 20-an de februaro.

Aliĝinformoj

Vi povas aliĝi aŭ sendante per poŝto la apudan aliĝilon al EAF aŭ retpoŝte al la adreso *eafmendoj@esperanto.fi* kaj pagante la koncernajn pagojn al la konto de EAF. Memoru uzi la referenc-numeron sen indiki temon de la pago. Bonvolu noti, ke ne sufiĉas nur sendi la pagon al la konto, ĉar ni bezonas krome scii kiujn programerojn vi partoprenos. Lokoj por la muzea vizito dimanĉe ni rezervos laŭ viaj informoj (kunportu muzean karton, se vi havas tion).

Notu ke por la manĝoj ni dezirus scii pri viaj eblaj alergioj. Lunĉo kaj kafo sabate estas inkluzivitaj en la programo. La vespermanĝon



ALIĜILO



Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 4.–5.3.2017 en Helsinki.



Nomo: _____

Adreso: _____

Tel./retpoŝto: _____

Partoprenkotizo

La kotizo inkluzivas programojn ambaŭtage (ankaŭ muzean viziton) kaj lunĉon kaj kafon sabate.

50 € ĝis 20.2.2017 _____

55 € post 20.2.2017 _____

40 € por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo (pago pri la lunĉo).

Vespermanĝo sabate en Ravintola Arthur

(ĉ. 30 €): _____

(pago surloke, aliĝu por rezervado de lokoj, ni informos pri menuo)

Mi venos al la muzea vizito dimanĉe (hejmo de Mannerheim): _____

Entute pagenda al la konto de EAF: _____

Pagoj al la konto: Helsingin Osuuspankki
FI82 5721 1520 2859 38.

Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640 (ne skribu aliajn informojn en la pagilo).

Pliaj informoj (ekz. alergioj) aŭ deziroj aŭ demandoj:

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65,
FI-00530 Helsinki.

kaj retaj aliĝoj tra *eafmendoj@esperanto.fi*

Bonvenon!





ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun EAF:n Talvipäiville Helsingissä

4.–5.3.2017.

Nimi: _____

Osoite: _____

Puh./sähköposti: _____

Osallistumismaksu

Maksu sisältää viikonlopun ohjelmat (myös mu-
seokäynnin) sekä lounaan ja kahvin lauantaina.

50 € 20.2.2017 asti _____

55 € 20.2.2017 jälkeen _____

40 € FEJO-jäsenille alle 30 vuotta. Alle 15 v. lapset
ilman osallistumismaksua (maksu lounaasta).

Illallinen lauantaina, ravintola Arthur

(noin 30 €): _____

(maksu paikan päällä, ilmoittaudu paikkamäärää
varten, ilmoitamme menusta erikseen)

**Osallistun sunnuntaina vierailulle Mannerhei-
min kotimuseoon:** _____

**Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton
tilille:** _____

Tilinumero: Helsingin Osuuspankki

FI82 5721 1520 2859 38.

Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja viite-
tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja, toivomuksia ja/tai kysymyksiä:

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto

Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse eafmendoj@esperanto.fi

Tervetuloa!



Venontaj

sabate kaj lunĉon dimanĉe ni mendos laŭ aliĝoj
(vidu aliĝilon) kaj informos pri la menuoj pli
proksime.

Ĉiu partoprenanto aranĝu kaj pagu mem sian
tranoktadon. Informu al hotelo Arthur ke vi par-
toprenos la Tagojn, se vi decidis tranokti tie. Pli-
ajn informojn vi ricevos de la kontaktpersonoj.

Vi povas demandi koncernajn aferojn de la
funkciuloj de EAF jene: la oficialaj kunvenoj:
Tuomo Grundström kaj Tiina Oittinen, progra-
maj aferoj: *Päivi Saarinen kaj Tiina Oittinen*,
monaferoj: *Tiina Kosunen*, alveno al Helsinko,
tranoktado (hoteloj kaj aliaj) kaj restoracioj:
Päivi Saarinen.

Ĉiuj kontaktpersonoj estas funkciuloj de
EAF, kontaktoinformojn vi trovas sur la pago 2.
Pli detalaj informoj pri la programo aperos en
Esperantolehti 1/2017 kaj sur la retpaĝoj: www.esperanto.fi

*Vuosi 2017 on sekä Suomen (100 vuotta) että
Suomen Esperantoliiton (110 vuotta) juhluvuo-
si. Siksi talvipäivät ja vuosikokous pidetään
juhluvuonna hotelli Arthurissa, perinteisessä
kokouspaikassamme Helsingin Kaisaniemessä.
Kokoushuoneena on auditorio, joka sijaitsee
NNKY:n entisissä tiloissa. Ohjelmassa on myös
yhteinen lounas ja kahvi hotellin tiloissa.*

*Päivien ohjelma alkaa yleisöluennolla ja pa-
neelikeskustelulla esperanton kielestä ja kult-
tuurista. Luennoitsijat ja paneelin osallistujat
varmistuvat tammikuussa.*

*Liiton vuosikokous pidetään lauantaina ho-
tellin auditoriossa. Tule päättämään yhdistyk-
sen asioista niin nyt kuin tulevaisuudessa, osal-
listumisesi on tärkeää. Vuosikokouksen jälkeen
on vastaanotto Nino Runeberg -seuran jäsenil-
le: liity mukaan tukemaan tällä tavoin liiton
toimintaa. Illanvietossa tutustumme muistoihin
yhdistyksen arkistoista: mukana on mm. Vilho
Setälän valokuvia ja filmi hänen matkastaan
Bolognan kongressiin. Illallista haluavat voivat
jatkaa yhdessäoloa hotellin ravintolassa.*

*Sunnuntain ohjelmassa on vierailu Manner-
heimin kotimuseoon Helsingin Kaivopuistossa.*

Museo toimii puisessa huvilarakennuksessa, joka oli Suomen marsalkka Carl Gustaf Emil Mannerheimin kotina vuosina 1924–1951.

Ilmoittaudu päiville mahdollisimman pian, edullisemmin 20.2. mennessä.

Ilmoittautuminen

Ilmoittaudu lähettämällä oheinen lomake Suomen Esperantoliittoon tai samat tiedot sähköpostilla osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi sekä maksamalla vastaavat maksut liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita viite- tai viestitietoja. Huomaa, että pelkkä maksun lähettäminen ei riitä, sillä tarvitaan myös tiedot siitä, miten olet osallistumassa ohjelmaan. Paikat illalliselle lauantaina varaamme ennakoilmoittautumisen mukaan, lähempänä päiviä ilmoitamme vielä menuvaihtoehtot.

On myös tarpeen tietää sunnuntaina museokäynnille osallistuvat, sisäänpääsymaksu kuuluu ohjelmaan (jos sinulla on museokortti,

hyödynnä sitä). Majoituksen ja muut ruokailut jokainen hoitaa ja maksaa erikseen. Jos yövyt hotelli Arthurissa, mainitse että tulet talvipäiville. Yhteyshenkilöiltä saat tarvittaessa opastusta ja lisätietoja.

Talvipäiviin liittyviä asioita voi tiedustella liiton toimihenkilöiltä seuraavasti: liiton vuosikokous ja muut kokousjärjestelyt: Tuomo Grundström ja Tiina Oittinen, ohjelmatiedot: Päivi Saarinen ja Tiina Oittinen, raha-asiat: Tiina Kosunen. Helsinkiin tuloon, majoittumiseen (hotellit ja muut) sekä ruokailuihin liittyvät asiat: Päivi Saarinen.

Kaikki ovat liiton toimihenkilöitä, yhteystiedot lehden sivulla 2.

Tarkempia ohjelmatietoja on seuraavassa Esperantolehdessä. Seuraa myös tiedotusta liiton verkkosivuilla www.esperanto.fi.

Bonvenon! Tervetuloa!

Estraro, hallitus.

Alvoko – Kutsu – Kallelse

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos sabaton, la 4-an de marto, 2017 je la 15.30 horo en Helsinki, en la kunvenejo de hotelo Arthur, adreso: Vuorikatu 19, 00100 Helsinki. En la kunveno estos traktitaj la laŭstatutaj jarkunvenaj aferoj.



Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään lauantaina 4.3.2017 klo 15.30 alkaen Helsingissä, hotelli Arthurin auditoriossa, osoite: Vuorikatu 19, 00100 Helsinki. Kokouksessa käsitellään liiton sääntömääräiset vuosikokousasiat.

Esperantoförbundet i Finland håller sitt stadgeenliga årsmöte lördagen den 4.3.2017 kl. 15.30 i Helsingfors, i mötesutrymmen av hotel Arthur, adress: Berggatan 19, 00100 Helsingfors. Mötet behandlar de i förbundets stadgar föreskrivna årsmötesärendena.

La estraro – Hallitus – Styrelsen



Foto: La partoprenantoj de la Tagoj
Fotoj: Dima Ševcenko

Nia vojaĝo tra Finnlando kaj fabelaj tagoj en Taivalkoski

Nia vojaĝo al Finnlando komenciĝis en Moskvo, kie ni frumatene prenis la rapidtrajnon "Sapsan" kaj post ĉ. 4 horoj ni jam estis en Sankt-Peterburgo, poste ni venis per metroo al

la alia trajnstacidomo kaj uzis "Allegro"-trajnon ĝis Helsinki. Estas mirinde, ke nun el Moskvo eblas atingi Finnlandon tiom rapide sen uzi la aviadilon.

Ĉe la stacidomo de Helsinki nin renkontis ĉarma *Raita Pyhälä*, kiu antaŭe uzis la kromnomon Saliko, sed nun ne ŝatas ĝin uzi. Kune ni tuj ekvojaĝis al la apuda urbo *Hyvinkää*, kie ŝi loĝas. Tre rapide ni komprenis, ke ni trafis ĝustan lokon kaj ĝustan momenton – ni bonŝancis sperti Finnlandon tia, kia ĝi estas interne tiel, kiel oni ne povas sperti ĝin, se uzi kutimajn turismajn itinerojn.

La tagon, kiun ni venis, ni havis belan vesperon gaste ĉe Esperanto-familio en *Hyvinkää*. *Tina* kaj *Sigrid* preparis multajn bongustaĵojn kaj kreis belegan etoson. Dank' al *Raita* ni ricevis bonajn unuajn impresojn pri la suda Finnlando. Ni vizitis kelkajn parkojn kaj kun ŝia filo ni vizitis multajn naturajn



Markus, Raita, Anna (Arbaro kaj rivero apud la urbeto *Hyvinkää*.)

vidindaĵojn de la regiono.

Ĉi tie ĉie kuŝas ŝtonoj: kaj grandaj kaj malgrandaj, sur ili kreskas varma musko. Iam ili estis altaj montoj kaj de sia alteco rigardis al la mondo, eĉ al la nuboj. Kaj poste, kiel diras la lokanoj, glaĉero detruis la montojn, kaj la ŝtonojn portis kun si. Poste ĝi degelis, lasinte la ŝtonojn en tiuj lokoj, kie tio okazis.

En Hyvinkää Anna havis la unuan prelegon el la prelegserio, kie en urba biblioteko ŝi rakontis pri samaj motivoj en la fabeloj de diversaj landoj. Ŝi prelegis en Esperanto, en la finnan tradukis *Tuomo Grundström*. Li iĝis nia vera anĝelo dum la vojaĝo, organizante ĉion kaj aperante ĉie kaj ĉiam en diversaj urboj de Finnlando por traduki, helpi, solvi ĉiujn demandojn. Tuomo estas nia "Esperantisto de la jaro" el Finnlando :)

Poste ni trajne ekvojaĝis al *Oulu*, kiu situas en norda parto de Finnlando por partopreni Aŭtunajn Tagojn, kiuj okazis en *Taivalkoski*. La 24-an de septembro tie Anna havis la duan prelegon pri fabeloj. Ĉi-foje nur en Esperanto, sen traduko al la finna – ĉiuj ĉeestantoj estis esperantistoj.

La partoprenantoj povis ĝui luksajn kondiĉojn



Tuomo ĉe floso



Tuomo, Anna prelegas

de la loĝado en komfortaj kabanoj. La aranĝo estis por ni iom nekutima, unue pro tio, ke ĝi estis tre mallonga – nur du tagojn, kaj due, ĉar ĝi ne enhavis multajn Esperanto-programerojn, preskaŭ ĉio estis diversaj ekskursoj. La ekskursoj mem dum la Aŭtunaj Tagoj estis vere fabelaj. Nordo de Finnlando, eĉ la regiono mem sonas fabele – Laponio (Laplando). *Ĝi estas mistera kaj malvarma limo inter nia mondo kaj brilanta reĝlando de Neĝa Reĝino. Lokoj apud Taivalkoski estas ne tiom ofte vizitataj de homoj, foje ŝajnis, ke eĉ la boacoj estas plejrajtaj posedantoj de la regiono, sed ne la homoj.*

Ni vojaĝis al la domo de konata finna verkisto *Kalle Päätalo*, apud kiu estis aŭtentika floso kun fajrujo, kiun iam uzis arbofloristoj. Ni vizitis forlasitajn ruinojn, kovritajn per tero kaj musko de la iama infrastrukturo de la milita fervojo, kiun konstruis germanoj dum la Dua Mondmilito: restaĵoj de la lokomotiva riparejo, barakoj kaj aliaj konstruaĵoj.

La regiono de Taivalkoski estas plena de fantomoj. Jen kia historio aperis ĉe Anna dum ekskursiva programo dum Aŭtunaj Tagoj: *Jam plene ensorĉigita per dense-trista beleco de norda severa naturo, mi staris sur arbara rando kaj ne povis elekti inter observado kaj aŭskultado. La arbaro vokis min, arbaj branĉoj kaptis mian pelton kaj susuris: "iru enen, rigardu – ĉu vi vidas nigran katon? Ho, ne kreu la*



viaj okuloj – estas nur lignopeco. Kaj koboldan barbon, kiu pendas sur branĉo vi vidas? Ha-ha, estas nur musko”. En tiu arbaro branĉetoj similis al palaj homoj, marĉaj montetoj moviĝis kaj ĉio volis montri sin al mi. Sed ankaŭ aŭskultado de ĉiĉerono ege meritis mian atenton. Antaŭ mi estis ruinoj de iama trajnriparejo. Naturo jam preskaŭ forglutis ilin. De ili komenciĝis la rakonto.

Dum la Dua Mondmilito tie estis fervojo, konstruata de nazioj, per fortoj de militkaptitoj. Malvarma klimato, netolerebla laboro, superhome malfacilaj vivkondiĉoj, rompita kaj neniiĝitaj animoj. Neniu scias kiom da ili kuŝas nun sub malvarma tero, kie iam estis fervojo. Verŝajne ankaŭ per iliaj voĉoj parolis kun mi sendorma sorĉa arbaro.

Poste ni vizitis lokon, kie estis entombigitaj (danke al ies bonkoreco, homece entombigitaj) 13 rusaj militkaptitoj. Mi ial tuj ekpensis, ke se vere restis tie, sub sola blanka kruco io de ili, de malfeliĉaj ombroj, kiuj iam estis homoj, do ili nepre volas ordinaran homan varmon. Do, mi metis manon sur iom glaciigintan teron, kaj... Kaj io absolute hela pleniĝis miajn pensojn, io tute ne ligita kun torturoj, kun milito, io arbarefabela. Anstataŭ sola blanka kruco aperis antaŭ mi 13 lignaj, manfaritaj krucetoj kaj unu duondiafana viro kun kamparana vizaĝo, li maĉis herbeton kaj duonridetis.

Poste venis aliaj 12 fantomoj. Ili, fantomoj, ne aspektis tristaj, ili ne estis torturigitaj kaj sennobligitaj ombroj, dum dekoj da jaroj ili restadis en fabela arbaro kaj jam iĝis ĝia parto, iliaj homaj destinoj restis ie tre-tre malproksime. Kiam post kvaronhoro mi rekonsciĝis kaj levis manon de sub glaciiginta tero, miaj fingroj estis varmaj.

Anna pentris ĉiujn el tiuj 13 fantomoj, la bildojn vi povas vidi en ŝia FB-paĝo <https://www.facebook.com/anna.striganova>.

Aparte menciindas akcepto dum la lasta tago, kiun okazigis Aini Vääräniemi en sia bieno kaj vizito de mirakla Esperanto-arbaro, kie arboj havas nomojn de diversaj landoj kaj Esperanto-asocioj. Tie estis inaŭguritaj arboj de Rusio kaj



Fantomo

Brazilo, kiuj mankis ĝis tiu ĉi tempo.

Poste ni vojaĝis al Turku. Kaj denove sudo de Finnlando, ĉi foje urba regiono. Turku estas la urbo, kie noktumas la nebulo, kiuj ujute (komforte) kovras la kamparojn, kie en la antikva gotika katedralo pendas, kvazaŭ flugante, lignaj ŝipoj kaj super la nova haveno staras, lumante per la fenestroj, kavalira kastelo. Ĝi staras,



Anna, Dima kaj la rusa arbo. Fotis Harri Laine

kvazaŭ insulo – tiom simpla, homeca, dormema – inter du mondoj – granda metala haveno kaj malvarma vintre reĝlando de la nebulo. Maro, malvarma norda finnlanda maro, kaj la rufa lumo en la fenestroj de la ĉebordaj domoj, fiŝkaptistaj retoj, forgesitaj ĉe la bordo... Kari Pyykkö amike akceptis nin, montris al ni Turku, ĝiajn belajn ĉirkaŭaĵojn kaj apudajn regionojn. Dankon, Kari! Dum tiuj du tagoj ni gastis ĉe Olga kaj Mikko Mäkitalo, kiuj loĝas en rando de la urbo.

La sekva prelego de Anna okazis en la instituto *Aurala* en Turku, kie nin varme akceptis lokaj esperantistoj. Aparte ni volas danki *Tiina Oittinen* pro la bona organizado de nia restado en la urbo kaj bongusta vespermanĝo en la amika etoso kun esperantistoj.

Poste ni vojaĝis al *Laitila*, kie Anna prelegis en loka biblioteko. Tuomo ankaŭ faris por ni ekskursion al la lernejo, kie li laboris multajn jarojn kaj konatigis kun ties instruistoj. ▶▶



Telma kaj la arbo de Brazilo. Fotis Harri Laine



Fino en la bieno de Aini, fotis Harri Laine

Sekvis prelego en biblioteko de *Pori*, kie nin gastigis *Paula Niinikorpi* kaj *Robert Bogen-schneider*. Robert miris pri nia veno, ĉar li opiniis, ke mi ŝercis, kiam dum UK en Nitra mi komunikis al li niajn planojn viziti Finnlandon. :) Paula konatigis nin kun bela urbo kaj regalis per bongustaj lokaj manĝoj.

Ni tre kontentas pri tiu sufiĉe spontana, bunta kaj multkolora vojaĝo al Finnlando, kiu donis al

ni multajn impresojn kaj spertojn.

Dankon, karaj!

Multajn fotojn pri la vojaĝo vi povas vidi en niaj FB-paĝoj:

www.facebook.com/anna.striganova

www.facebook.com/dmitry.shevchenko.1690

Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova
Moskvo



Paula kaj Dima en Yyteri

Edukado.net jam de 15 jaroj en nia servo

Antaŭ ses jaroj, en oktobro 2010, *Edukado.net* lanĉis sian nunan retpaĝaron. Tiam la retejo estis rekonstruita el la subtendonacoj de la membroj. Nun oficiale tie aperas nova projekto EKPAROLU!, kiu helpas komencintojn en la praktikado de parolado. Plie, Edukado.net sukcesis kunlabori kun nederlanda entrepreno, kiu akceptis aperigi Esperanto-version de sia porinfana kurso por apoj kaj android-aplikaĵoj. La android-versio jam elŝuteblas, la iOS-versio aperos.

La 12an de decembro Edukado.net enigis pliajn 15 laŭdindajn esperantistojn en la Panteonon. Edukado.net nun havas entute 4462 registritajn uzantojn el 131 landoj. Ne ĉiuj ak-



tivas, sed tamen multaj uzas la retejon, elŝutas instrumaterialojn, ludas RISKO-n, registras kursojn kaj lernas en la KLERIGEJO.

Ĝis nun pli ol 1850 personoj trapasis KER-ekzamenon kaj plurcentoj profitis el la kursoj kaj trejnadaj. Edukado.net havas multajn kialojn por festi. Do, ni gratulu ĝin kaj ĝiajn diligentaĵajn ideoplenajn stabanojn.

Raita Pyhälä

Kaptema kaj brila verko vere leginda

Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj 1888–2015

Kvinpersona laborgrupo sukcesis finpretigi sian gravan laboron en junio 2016. La kvarvoluma verko inter la samaj kovriloj estas presita en Finnlando ĉe *Keuruskopio*. Gravan kaj signifan kontribuon donis la helsinkianino *Ritva Sabelli*.

Avide kaj kun granda entuziasmo mi komencis legi ĉi tiun unikan libron. Du gravaj kaj aĝemaj aktivuloj finnaj, *Arvo Karvinen* kaj *Oskari Lehtivaara*, apartenis antaŭ multaj jaroj al la samaj laborrondoj de vidantaj esperantistoj kun mi kaj aliuloj. Jam tiam mi admiris ilian energion kaj celkonscian aktivadon.

La ruĝa fadeno de la enhavo estas biografioj de konataj diverslandaj aktivuloj inter blindaj esperantistoj. Puran kaj inspiran ĝojon vekas la multflanka raportado pri niaj malforte vidantaj gesamideanoj. Jam en la jaro 1888, do tre

frue, vidhandikapuloj komencis organizi siajn sociajn retojn. Indas mem persone ekkoni la abundan materialon informan kaj instruan en la nova publikaĵo.

Indas menciĝi, ke en la jaro 1914 aperis esperanta-finna vortaro en brajla skribado. Kompreneble Ritva Sabelli meritas varman gratulon pro sukcesa kaj fruktodona agado inter la blindularo.

Fine ĉarma bagatela memoro. Estis ŝipa renkontiĝo inter Turku kaj la sveda ĉefurbo Stokholmo. Vane mi provis trovi en mia kajuto elektran kontakton por mia razilo. Oskari Lehtivaara konsilis: rigardu malantaŭ la spegulon. Blindulo trafis helpis la vidanton. Mi estis kontenta kaj dankema. Etaj surprizoj estas ĉiam en la vivo agrablaj spertoj.

Jorma Ahomäki

Medicinistoj premiitaj

La Fonduso *Germain Pirlot* celas kuraĝigi la publikigon kaj eldonadon de sciencaj, teknikaj kaj ekonomiaj verkoj en Esperanto. La decidon pri la premioj faras la senato de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS). La premio estas aljuĝata en kvar branĉoj: libro, artikolo, reta kurso kaj prelego.

Tiun ĉi jaron medicinistoj estis bonŝancaj danke al la aktiveco de nia prezidanto d-ro *Christoph Klawe*, kiu kuraĝe sendis ĝustatempe konvenajn kandidatojn al la premio Pirlot. Sekve d-ro *István Hegyi* el Hungario gajnis la unuan lokon en la branĉo “artikolo” per sia artikolo “Kooperado de la du hemisferoj” (MIR 25-a

volumo, n-ro 3) kaj d-ro Klawe (Germanio) mem gajnis la unuan lokon en la branĉo “prelego” per sia prelego “AlphaGo kontraŭ Majstro Lee: artefarita inteligenteco kaj homa cerbo kiel bazo de la biologia” prezentita en Luksemburgo en majo ĉi-jare. Temis pri la konkuro de komputilo kaj la plej lerta spertulo *Lee Sedol* en la ludo nomata Go, kiu iom similas al ŝako, sed estas ankoraŭ pli komplika.

Do, medicinistoj aktivigas kaj povas fieri pri la premioj kaj kuraĝas plenkore voki pliajn esperantistojn- medicinistojn al siaj sciencaj rondoj!

Arja Kuhanen

Esä Juhani Lång

9.12.1934 – 5.10.2016

En la historia verko *Esperanto Lahdessa* (Esperanto en Lahti) kiun Esa redaktis en la jaro 2007, li prezentas sin mem tiel: (esperantigita teksto) ”Mi naskiĝis 1934, mi vizitadis 2-jaran metiolernejon. Mia metio estas masonisto. Mi komencis lerni Esperanton 1978, do estante 45-jaraĝa. La komenco estis malfacila ĉar unue mi devis lerni lernadon. Post 3-jara intensa studado mi komencis paroli kaj kompreni. Tio donis intereson kaj memfidon. Mi estis prezidanto de la klubo jam pli ol 20 jarojn, kio estas tro longe. Esa”

Kiam 1987 pro la centjariĝo de Esperanto kaj pro la baldaŭa 20-jariĝo de Esperanto-klubo de Lahti, la ĵurnalo *Etelä-Suomen Sanomat* publikigis tutpage artikolojn pri Esperanto. Post legado de la artikoloj mi tuj kontaktis Esan kaj demandis de li aferojn rilate al Esperanto, li estis la unua esperantisto kiun mi persone renkontis kaj post tio mi komencis partopreni kunvenojn de la klubo.

La hejmon de Esa kun la bela ĝardeno en *Patomäki* mi ankaŭ baldaŭ vizitis. Krom tiu domo Esa konstruis kvin somerdometojn al siaj fratoj kaj al si mem. Multaj gastoj el multaj landoj vizitis la hejmon en Patomäki kie Esa kaj lia edzino *Pirkko* loĝis ĝis 2014 kiam ili translokiĝis al servodomo ĉe *Onnelanpolku*.

Sed Esa ne nur konstruis domojn, li ankaŭ verkis, krom la supre menciitan historion pri E-klubo de Lahti, ankoraŭ du aliajn librojn (*Sadan Vuoden Mesta. Lahden seudun muurarien sadan vuoden historia, Työväen Tutkimus palkinto* 2004) kaj libron pri la urboparto *Pyhätön* en *Lahti* (*Viluvuokon Maa. Lahden Pyhättömän historia* 2010, 2-a eldono 2011). Krome Esa verkis multajn noveletojn kaj rakontojn kiuj estis publikigitaj inter la jaroj 1950–70 en diversaj ĵurnaloj



kaj gazetoj, i.a. *Perjantai* kaj *Rakentaja*.

Post 2007 Esperanto-klubo de *Lahti* ne plu tre aktive agadis, sed Esa laboris ĝis sia morto plej fidele en la grupeto da esperantistoj kiuj fojfoje kunvenis. Ĉijare, 2016, Esa senĉese provis aranĝi kunvenon sed ĉiam estis diversaj prokrastoj ĝis en fino de septembro li invitis ”Lahden Esperanto-kerho. Kerran vielä yhdessä!” (Esperanto-klubo de Lahti. Ankoraŭ foje kune!) al la restaŭracio *Wanha Herra*, 5.10.2016. Mi parolis telefone kun Esa unu semajnon antaŭ la kunveno. Tiam li ĵus estis veninta en malsanulejon sed li esperis povi partopreni la kunvenon. Tio tamen ne eblis al li, lia malsano estis grava, i.a. jam multajn jarojn lin ĝenis asbestozo, sekvo de konstrulaboroj. Tamen deko da pli malpli maljunaj sed viglaj esperantistoj kunvenis, ĝoje babilis pri pasintaj tempoj kaj malpli ĝoje pri la estonteco... Esa ĉeestis forte en niaj pensoj, kvankam ne fizike. Ni skribis salutleteron al li kaj finis nian kunvenon ĉ. je la 15:30. Proksimume samtempe Esa en la hospitalo forlasis ĉi tiun mondon. Lia tasko estis plenigita.

La solenajn funebrajn ceremoniojn (22.10.2016 en *Valon kappeli*, tombejo *Levo* kaj poste memorfesto en *Harjula-keskus*) partoprenis 7 esperantistoj kiuj flanke de UEA, EAF, la E-klubo de Lahti kaj persone honorigis lian memoron, dankante lin por fidela laboro por la internacia lingvo.

La vivo estas eterna, ĉio cetera estas nur portempa. Do, ripozu en paco, amiko!

Börje Eriksson

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperanto-lehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ www.esperanto.fi/helsinki jukka.pietilainen@helsinki.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 ☐ onni.kauppinen@gmail.com
- ♦ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) Esperantoklubo de Jyväskylä, c/o Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ 044 953 4454 ☐ kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala ☐ www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☐ matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaüen r.y. / Esperanto-societo Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere ☐ www.esperanto.fi/tampere (Tapani Aarne: tapani.aarne@mbnet.fi ☎ 050 5245 823)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. ☐ tiina.oittinen@pp.inet.fi ☎ 050 549 4709
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. ☐ sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Näkövammaisten esperantoyhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 ☐ steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden hinta jäsenille on 16 € tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 22 € sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 44 €. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). ☐ bovoeo73@gmail.com.

Esperanton harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Hyvinkäällä, Maarianhaminassa, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella.

Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta, ks. hallituksen yhteystiedot sivulla 2.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2017

Nro	Limdato	Aperas
1/2017	28.1.	en februaro
2/2017	31.3.	en aprilo
3/2017	31.5.	en junio
4/2017	1.9.	en septembro
5/2017	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 €	1/1 sivu/paĝo 50 €
1/2 sivu/paĝo 60 €	1/2 sivua/paĝo 30 €
1/4 sivu/paĝo 40 €	1/4 sivua/paĝo 20 €

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:

eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo:
Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65,
00530 Helsinki.



Posti Green

Esperanto-societo Antaŭen informas

Antaŭen havis siajn elekto- kaj estrarkunvenojn la 21-an de novembro. Estraranoj por la jaro 2017 estos jenaj:

- *Tapani Aarne*, prezidanto/kasisto
- *Veli Hämäläinen*, vicprezidanto
- *Sylvia Hämäläinen*, sekretario
- *Raimo Tuisku*, estrarano
- Vicestaranoj: *Terhi Laaksonen*, *Marjatta Ström* kaj *Markus Sunela*.
- Agadkontrolantoj: *Paula Niinkorpi* kaj vice *Anja Karkiainen*.

Eventoj en la jaro 2017 en la klubejo "Nesto":

- 9.1. je la 17.00: Januara vespero
- 18.1. je la 11.30: Esperanto-klubo
- 6.2. je la 17.00: Februara vespero
- 20.2. je la 17.00: Jarkunveno
- 6.3. je la 17.00: Marta vespero
- 10.4. ja la 17.00: Aprila vespero

Bv. vidi precize pri temoj de vesperoj ktp. ĉe la retejo de Antaŭen:

www.esperanto.fi/tampere/Ohjelma

Latvia Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni **la 53-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-53) de la 1a ĝis la 8a de julio 2017 en Liepāja.**

Vidu www.esperanto.lv

PROVIZORA PROGRAMO: diversnivelaj Esperanto-kursoj, enkonduka kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, Sankta Meso en Esperanto, Interkona, Nacia kaj Internacia Vesperoj, duontagaj kaj tuttaga ekskursoj, kvizoj, filmoj, kantoj, dancoj k. a. aranĝoj.

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuussa. Aineisto 28.1.2017 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en februaro. Artikoloj ĝis 28.1.2017 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.